

Antaŭ dudek jaroj, mi rolis kiel Ĝenerala Sekretario de UEA, kun respondeco ankaŭ pri la eksteraj rilatoj de la Asocio. Ofte mi cerbumis pri tio, kiel mi klarigu la mision de UEA al la aktivuloj de aliaj organizoj, kiuj malmulte sciis pri Esperanto kaj tute ne vidis ĝian rilaton al iliaj celoj kaj zorgoj.

Dum iu aviadila vojaĝo, mi komencis skizi ideojn por nova informilo, kiu tre koncize resumos la nuntempan socian signifon de Esperanto. La temoj demokratio, homaj rajtoj, edukado tuj proponis sin. Iom post iom aldoniĝis aliaj. Alvenante hejmen, mi jam havis liston de sep tezoj, kiu jam komencis aspekti ne simple kiel informilo, sed kiel manifesto.

Tiel naskiĝis la teksto, kiu post iom da polurado kaj la aldono de enkonduko fariĝos la Manifesto de Prago. Estis la ideo de Osmo Buller, antaŭnelonge enposteniĝinta kiel Ĝenerala Direktoro, proponi la dokumenton por individua subskribado en la 81-a UK en Prago, post ĝia formala prezento al la Komitato de UEA kaj en la Solena Inaŭguro. Lia koncepto montriĝis brila sukceso: ĝis la jarfino, pli ol dekmilo da homoj konfirmis sian subtenon por la ideoj tie esprimitaj.

[...] Sed tiu estas nun historia verko, signifa en sia kunteksto, sed bezonanta reinterpreton kaj ĝisdatigon por respondi al la demandoj de la nuntempo.

En 1996, Interreto estis ankoraŭ naskiĝanta, Google ankoraŭ ne fondita; Clinton estis prezidento de Usono, Jelcin de Rusio, Jiang de Ĉinio; estis planata grava UN-konferenco pri klimatsanĝiĝo en Kioto; debutis la brita popgrupo *Spice Girls*. La novnaskitoj de tiu jaro nun finstudas, voĉdonas, movadas. Oni ne povas atendi, ke la ideoj de tiam plu taŭgas senŝanĝe.

La mondo estas nun multe pli klare interligita, ol antaŭ dudek jaroj. Sed tiu interligiteco ne donis al ni unu grandan rondon familian. Male, la homoj jam komencas senti sin iom kunpremitaj sur malgranda planedo, kie oni ne povas eskapi la najbarojn. Eŭropo fermas siajn limojn al rifuĝintoj, virusoj disvastiĝas en Afriko kaj Ameriko, ekonomioj ŝanceliĝas pro korporaciaj decidoj trans oceanoj kaj kontinentoj. Malegaleco rekreskas, post jardekoj da ŝrumpo. Ekstremaĵoj ideologioj regajnas sian popularecon.

Tiaj estas la tendencoj, al kiuj devas respondi aktualigita Manifesto de Prago. Demokratio, jes – sed efektiva demokratio ankaŭ por la malfortaj kaj la ekskluditaj. Transnacia edukado, jes – sed edukado al pli profunda kono ankaŭ de sia propra loĝloko kaj ĝiaj nehomaj kunloĝantoj. Pedagogia efikeco, jes – cele ne simple al lingva, sed ankaŭ al kultura, interkultura kaj ekologia klereco. Plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco, jes – sed kunlige kun la streboj por indiĝenaj rajtoj kaj la protektado de la vivodiverseco sur la tero.

La Manifesto de Prago asertas Esperanton “unu el la grandaj funkciaj projektoj de la homa emancipiĝo”. Ĝi povas esti tia, tamen, nur se ni efektive uzas ĝin por rigardi trans la limojn de niaj propraj antaŭjuĝoj, la sekurigajn murojn konstruitajn de nia eduko kaj nia civilizo. Tion klare celis Zamenhof. Lia mondo de homaranoj kreiĝis nur per zorga kleriga laboro, en eduka kaj etika spaco fundamentita sur lingvo neŭtrale homa. La lingvo en si mem ne sufiĉas.

Estas ĝojige konstati, do, kiom da klerigaj renkontiĝoj kaj interŝanĝoj fariĝas eblaj surbaze de ĉi tiu modesta libro. La delegitoj de UEA portas la lingvon, jes, sed ankaŭ vastajn konojn pri siaj lokoj kaj landoj, siaj karieroj kaj kulturoj. La vivo de

Esperanto fontas el la kolizio kaj kunfandiĝo de tiuj konoj. Imagu ekzemple homon, kiu edukus sin pri la mondo nur surbaze de la talentoj troveblaj en ĉi tiuj paĝoj. Li aŭ ŝi havus certe la ŝancon fariĝi pli klera mondcivitanoj, ol la vasta plimulto de siaj kunhomoj – kaj do, ankaŭ vivi pli saĝe kaj juste, surbaze de tiuj konoj.

Jen la radikala potenco de Esperanto, kiun celis vortumi la Manifesto de Prago. La ĉi-jara Universala Kongreso, en Nitro, Slovakio, invitas nin repreni la demandon: Kiel ni laboru por socia kaj lingva justeco, en epoko de granda maljusteco? La Jarlibro ne donas respondojn; sed ĝi invitas al esplorado.